



aktuala

33-a ELDONJARO

Fondita en 1976 de Leo de Bruyne, informilo kaj oficiala organo de Esperantista Brusela Grupo, societo neprofitcela centjara fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo "Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge" kun la N°0 419 498 274, honorigita reĝa societo ek de la 29a de Majo 1957. Redaktoro: Paulo Branco, 29 rue Froissart 1040 Etterbeek; Prezidanto: Angelos Tsimirkos, 405 av. Louise 1050 Bruselo; Kasisto: Claude Glady, cglady@arcadis.be, Abona membriĝo 10 eŭroj jare, konto EBG 000-0 123 048-52 Sekretario: Hélène Falk-Bracke, 7 avenue des Chênes, 1640 Rhode StGenese, informas +32 2 3584214, helene.falk@skynet.be; Kunvenloko n°2 rue Van Maerlant ĉiumerkrede 18h30-20h metroo MAALBEEK (tie nek poŝtkesto nek telefono) Informoj: <http://users.belgacom.net/EBG> <http://ebg.skynetblogs.be> <http://uea.org> www.esperanto.be www.esperanto.net <http://leo.eventeo.net>

KOTIZ-TABELO POR 2009	€	Rajtoj
Membro de EBG	10	Abono al "Aktuala" (organo de EBG)
Membro-junulo (ĝis 26-jaraĝa)	5	+
Membro-pensiulo, senlaborulo	7	partopreno en la vivo de la Grupo
Familia kunloĝanto	2	Partopreno en la vivo de la Grupo
Dumviva membro de EBG	250	Membreco kaj "Aktuala" dum la tuta vivo

Kara abonanto, por ke vi ne ĉesu ricevi Aktualan, bonvolu pagi tuj 10€ abonkotizon 2009 al kasisto.

ENHAVO

- Paĝo 2 - Hélène Falk-Bracke pri la Zamenhof-festo de EBG
- Paĝo 3 - Muriel Petit pri Internacia Junulara Kongreso
- Paĝo 4 - Eric Baert pri staĝo en Morbecque
- Paĝo 5 - André Demarque pri bastardiĝo de Esperanto
- Paĝo 6 - Paŭlo Moĵaev pri uzado de la akuzativo
- Paĝo 8 - Probal Dasgupta pri Zamenhof-tago
- Paĝo 9 - Koncerto de Cossavella kaj aliaj esperantaj eventoj
- Paĝo 11 - Osmo Buller pri membrara evoluo de UEA
- Paĝo 12 - Nova dungito de la UEA kaj vidpunkto alia
- Paĝo 13 - Ekskomuniko de Koffi Gbeglo
- Paĝo 14 - Poemaro
- Paĝo 15 - Ĝenerala jarkunsido 2008
- Paĝo 16 - Programo de la merkredaj kunvenoj

LA PAĜO DE HÉLÈNE FALK-BRACKE

Kompreneble, nia ZAMENHOF-FESTO titoliĝis ĉi-jare « VIVU POLLANDO! ». Ĝi celis esti enkonduko al la KONGRESO 2009 en BĴALISTOKO (25-07-2008). Malgraŭ la griza, malvarma vetero, la plezuro revidi samideanojn, kontakti kun aliaj, kiujn oni nur konis dank' al Interreto, tuj kreis varmkoran etoson. Eble ankaŭ la vodka helpis, kaj poste la bongusta, bone aromita pola supo, la polaj kneloj kaj la pola papava torto agordiĝantaj kun franca vino: blanka aŭ ruĝa. Ĉiuj gajmienis, des pli ke multaj junaj helpantoj permesis al nombraj gastoj ricevi deserton kaj kafon kaj vinon sen forlasi sian seĝon. Nur! por neriparebla teknika paneo! ni ne povis samtempe vidi la plej impresajn polajn pejzaĝojn sur fono de pola popola muziko... por aprezi Pollandon per la kvin sennoj! Por komenci la distran programon, nia prezidanto Angelos Tsimirkos rakontis la legendon, kiu klarigas la polan emblemon: LECH, la fonĝinto de la pola Ŝtato, ekvidis grandan aglan neston sur arbo. En ĝi estis unu blanka aglo kaj 2 aglidoj. Ĝi etendis siajn flugilojn antaŭ la ĉielo ruĝa pro sunsubiro. Pro tio, Lech elektis aglon kiel sian simbolon kaj decidis tie establi la unuan polan urbon GNIEZNO, kio signifas « nesto » en la pola.

Skeĉo libere adaptita de teksto de Stefan Macgill « Neniu problemo » estis la unua prezentado de kursanoj de EBG. Multaj amuzaj aludoj al flankoj de la esperantista vivo gajigis la publikon, kiu ne perdis okazon por ridi kaj aprezi la lingvan nivelon de kursanoj. Sekvis pupateatro pri alia pola legendo: ŝafisto nomita KRĀK venkis per ruzo la drakon kiu terurigis la urbon KRAKOVO: Kia laboro por nia profesia pupteatristino: imponaj 5 roluloj! eĉ la drako! la modulita voĉo de la rakontistino kapablas paroligi 4 rolulojn! Gratulon kaj dankon, Nelly. La poldevena pianisto Tadeo PAKULSKI naskiĝis en Bruselo, en 1994. Li jam regas sian muzikilon kaj partoprenis al pluraj oficialaj koncertoj. Li regalis nin per mazurko de F. CHOPIN kaj 2 etudoj de M. Moszkowski (fino de la 19-a jarcento), kiuj postulas grandan virtuozecon. Niaj aplaŭdoj konkretigis nian admiron. Li plu estas granda infano kaj ne rezistis la plezuron tuj eklegi sian 'Tinc'o en Tibeto' kaj 'Tintin au Tibet'.

Post la paŭzo, dum kiu oni povis profiti la Libroŝervon de la antverpena grupo 'La Verda Stelo', sin prezentis la pola koruso « POL KOR » organizita kaj gvidata de Zofia WISLOCKA. Ŝi kreis ankaŭ kordan orkestron 'I Musici Brucellensis', kaj estas orkestrino de ULB kaj prezidantino de la internacia ligo de orkestrinoj. La koruso konsistas el 10 polaj virinoj. Per mirinda energio kaj pasio ili lernis, de Zofia WISLOCKA, la solfeĝon kaj la decifron de partituroj. Ili kantis tutkore per kortuŝa spontaneco kaj donacis al ni kolorplenan spektaklon.

La lotoj de la tradicia loterio estis aparte nombraj kaj pluraj multvaloraj por Esperantistoj. Ĝi estis la fina bukedo de pirofajro.

Kaj ĉio nur eblis dank' al la sindonemo de granda skipo. Mi ne povas citi ĉiujn: Françoise Pellegrin kaj Nelly Bracke; Clara Bracke, Dina Deloyer kaj multaj aliaj EBG-anoj.

Tiu Zamenhof-festo estu signo de paco inter ni en nia diverseco. Bondezirojn al ĉiuj,

Hélène Falk



La Internacia Junulara Kongreso en Sombathely okazis inter la 26a de julio kaj la 2a de aŭgusto. Dum unu semajno, 365 homoj el tridek ses diversaj landoj, ĉefe el Eŭropo, sed ankaŭ el Azio, Amerikoj kaj Afriko estis kune por renkontiĝi kaj interkoniĝi.

Tiu semajno estis tre interesa kaj tre (eble tro) densa, riĉa: kiam dormi? Okazis multe da agadoj: esperantaj kursoj, urba ludo, legadoj pri diversaj temoj, dancaj kursoj, rigardaj vesperoj (dancoj, ludoj, sportoj...), manlaboroj, akvobatalo, ekskursoj kaj precipe renkontoj kaj diskutoj kun aliaj partoprenantoj. Laŭ mi, estis tre bona semajno kaj mi ankoraŭ dankas la klubon pro ĝia helpo por pagi la vojaĝo. Mi esperas ankoraŭ povi partopreni aliajn esperantajn kunvenojn! Se vi povos, ne hezitu kaj venu, estis agrable vidi aliajn homojn el ĉie kaj povi interparoli kune.

Kelkfoje, oni diras « eta desegnaĵo diras pli ol longa parolado ». Mi esperas ke ankaŭ estas vero pri fotoj!

Muriel Petit, ina ano de EBG



Muriel kaj Ludoviko kun Japano ...



Muriel kaj Ludoviko en restoracio Rugarino 25-06-2008



Muriel manlaboras .



Tradiciaj dancoj.



Lernado de ventra danco.



Iu mankas en la foto? Ĉu kontroleblas?

FOTOJ DE LA STAĜO EN MORBECQUE



Grupa foto de parto de la 87 partoprenantoj: 7 ĝis 9-11-2008



La kurso de Kristin Tytgat



Jean Deheux, Paulo Branco, Henri Deprez, Eric Baert, Martine Rysenaert, Janine Dugniolle, Jeannine Vanderstokken, Diemante Aniĉiene, Danièle Vanstraelen



Danièle Vanstraelen, Jeannine Vanderstokken, Eric Baert



Danièle Vanstraelen, Eric Baert, Jeannine Vanderstokken

RAPORTO : MORBECQUE 7 ĜIS 9-11-08

Partoprenis 87 samideanoj el diversaj landoj: Francio, Luksemburgio, Belgio, Britio, Ĉeĥio. Minimume 20 venis el Belgio; inter ili pluraj venis el Bruselo. Okazis pluraj prelegoj kaj distraj programoj: Vojaĝo per transsiberia trajno por iri al Yokohama; la kantoj de Mikaelo Bronŝtejn; Magio de Triksini; Prelego de Mikaelo Bronŝtejn pri la diversaj ĉefurboj de Rusio. Estis 5 niveloj de staĝo; mi-mem estis en la kvara grupo, de 15 personoj. Mi selektis tiun grupon en kiu oni devas paroli. Sed la magiisto kiu facile parolas, partoprenis en tiu grupo: li multe parolis kaj la aliaj ne povis sufiĉe paroli. Mi loĝis kun 3 aliaj personoj; tio ne estis tre komforta. Okazis 3 libroservoj: unue tiu de Gent vendis novajn librojn; due alia de Britio, kiu vendis malnovajn librojn: la prezo estis de 0.30 ĝis 2 eŭroj; trie Bronŝtejn kiu vendis siajn librojn kaj Kompaktajn Diskojn. La prezidanto de Esperanto Norda Francio, Xavier Dewidehem, salutis nin; li aĝas 27 jarojn kaj li estas juristo. Iu franca virino scipovis 21 lingvojn; kaj dum la staĝo ŝi studis la araban lingvon! Tiu staĝo okazas ĉiujare en novembro dum 2 tagoj; ĉi-jare estis la festo de la franca esperantista movado kaj okazis dum 3 tagoj. Por iri al Morbecque, oni povas iri per trajno: Tournai, Lille, Hazebrouck, kie la organizantoj nin transportis al Morbecque-Le Parc: oni povas iri per auto, aŭ per biciklo el belga stacidomo apud la limo.

Pri la vojaĝo per transsiberia trajno, la familio Plutniak delonge volis fari tion, ili unue vidis la siberian arbaron en la filmo « Dr Jivago », kaj poste, ili estis en Bruselo por viziti la ekspozicion pri tiu trajno; ili demandis la prezon al turisma oficejo sed la prezo estis tro alta. Dum ferio en Germanio, ili renkontis rusajn samideaninojn kiuj aranĝis la vojaĝon, sed ili devis esti grupo de 20 personoj. La 2 samideaninoj rusaj vojaĝis kun ili, kaj en la diversaj urboj, esperantistoj kun la flago atendis ilin. Gerrit Berveling estis en tiu karavano.

Eric Baert, ano de EBG

BERNARD-REGIS LARUE PRI LA SUNO PRELEGO 19-11-2008



Bernard-Regis Larue, Michael Cwik, Francine Sperber, Katarzyna Kuske, Georgia Henningsen, Marcel Delforge



Sidante Marcel Delforge, Paulo Branco, Michael Cwik, Georgija Henningsen, Katarzyna Kuske José Augusto Pinto de Sousa, Starante Françoise Pellegriin, Rosinne Dascotte, Bernard-Regis Larue, Barbara Poterucha, Hélène Falk-Bracke, Diemante, Angelos Tsirimokos, Sandra Schweder, Manca Turk

ESPERANTO BASTARDIĜAS

Jes, konsentite, la titolo estas provoko. Estas facila rimedo por dezirigi al vi legi tiun tekston!(?) Ciel, tio estas nur mia opinio, mi ne estas la Akademio, mi estas libera diri kion mi pensas. Kelkajn monatojn post kiam mi ekesperantiĝis, okazis en mia vivo anekdoto, malgranda anekdoto, sed mi ĝin neniam forgesos. Dum mia lasta kurso antaŭ la emeriteco (mi estis instruisto), mi klarigis al miaj ĝelernantoj kio estas Esperanto. Por montri kiom facila estas la gramatiko, mi elektis kiel ekzemplon la verbon « vidi ». Sed iu lernanto metis neatenditan demandon :

- Se «vidi» signifas «voir» (estas franglingvana lernejo), kiel oni diras «vider» (malplenigi) en Esperanto ?

- Mi ne scias, mi nur komencis lerni Esperanton de kelkaj monatoj, mi multajn vortojn ne konas bedaŭrinde...Sed, atendu, en Esperanto, eblas «fabriki» vorton, uzante simplajn elementojn de la lingvo - kaj mi pripensis laŭte - mi supozas ke « plein » estas «plena» en Esperanto, ĉar estas la sama radiko en la latina - kaj mi daŭrigis la serĉadon aldonante la afiksojn «mal-» kaj «-ig» kaj la finaĵon «-i» .

Fine, mi diris :

- Do, se mi bone pripensis, en Esperanto, «vider» estus «mal-plen-ig-i».

Mi havis vortareton, mi donis ĝin al la lernanto, petante ke li mem kontrolu.

Li kontrolis kaj diris :

- Jes, mi legas «vider : malplenigi».

Por mi, estis kiel miraklo! Mi fariĝis kreinto, mi kreis novan aĵon ! Kiam mi proponis la vorton «malplenigi», mi pensis, ke ne estis ĝuste. Tio estis por mi la unua sperto kiel kreinto ! Esperanto estis la 1 la lingvo kiun mi eklernis: en neniu alia lingvo, mi trovis tiun eblecon. De tiu sperto, mi estas konvinkita pri la supereco de Esperanto sur la aliaj lingvoj.

Mi ne pensis ke mi estas tre inteligenta, mi pensis ke la lingvo estas tre «inteligenta». La vorto «malplenigi» estas kunmetita vorto, do iomete longa: la radikalo enhavas tri silabojn. Se anstataŭ oni uzas la anglan verbon «to empty» eblus fari esperantan verbon kies radikalo enhavas nur tri literojn «emt-»! Feliĉe, tiu vorto ne ekzistas(ne ankoraŭ!?) Se tiu vorto ekzistus, mi estus tiom desafortita! «I would be so disappointed» pli bone diri se vi preferas la anglan. Mi estus elrevigita, mi elirus el mia revo, el mia revo de tiel bela lingvo.

Kiam mi vidis unuafoje la vorton «desaponti», mi tuj komprenis la signifon, danke al la angla verbo, sed «elrevigita» estas sensoplena vorto. Estas la sama elrevigo, kiam mi vidas tiajn vortojn: olda, frida, trista, rara, ĉipa, kurta, kajtielplu... Kie estas la genio de Zamenhof, kiu uzante la prefikson «mal-» dividis per du la kvanton de la adjektivoj? Kie estas la specifeco de la internacia lingvo kiu ebligas krei novan ideon per malnovaj lingvoelementoj?

Ciu neutila novvorto malriciĝas la lingvon. Esperanto pli kaj pli bastardiĝas, pli kaj pli fariĝas bastardo de la angla.

Ne diru tro rapide, ke mi estas konservativa... pri la alfabeto, male, mi ne komprenas kial universala lingvo, post pli ol unu jarcento ankoraŭ uzas tiom apartan, tute ne universalan alfabeton. Kiel ne uzi, ĉar ĝi ekzistas, universalan alfabeton (almenaŭ en la simpligita versio, la NHA, la Nova Help-Alfabeto). Ni estus liberigitaj de tiuj ĉapelitaj literoj kiuj tedegas nin. Krome, la NHA tre similas al la h-sistemo, kiun proponis Zamenhof (la FHA). Ĝi evitigas al ni neutilajn malfacilaĵojn kaj ni ne plu vidus preskaŭ dek diversajn skribmanierojn pri la sama vorto, kio, mi pensas, ekzistas en neniu alia lingvo (ĉu, chu, cxu, xu, c^u, ^cu, c'u, kajtielplu).

Laŭ aprecata prelego dufoje en EBG
André Demarque, Loveno-Nova

ŜERCO



Spritaĵo pri imagebla revo de Sara Pallin koncerne Barack Obama

Epitomo pri uzado de akuzativo I Akuzativo laŭ Paŭlo Moĵaev

Akuzativo estas la lingva elemento, kies ekzisto faras la lingvon pli fleksebla, pli riĉa, sed samtempe kies uzado povas konduki al gravaj miskomprenoj. Ĝenerala uzado de akuzativo estas neprega por ĉiu esperantisto, kiu pretendas esti komprenata kaj bona lingvo-uzanto. La tutan aron de reguloj pri uzado de akuzativo eblas dividi je ok grupoj:

1. Akuzativo kiel markanto de rekta objekto (rekta komplemento) de verbo.
2. Akuzativo de direkto.
3. Akuzativo en adjektoj (komplementoj cirkonstancaj) de tempo kaj grandeco (mezuro).
4. Akuzativo por indiko de dato.
5. Akuzativo post vortoj anstataŭ, krom, kiel, kvazaŭ.
6. Akuzativo post prepozicioj.
7. Akuzativo kaj predikativo.
8. Akuzativaj diversajtoj.



Paŭlo Moĵaev, alias Paŝa aŭ Mevo, havas multnombraj epitetoj: bardo, kantisto, kantaŭtoro, komponisto, verkisto, redaktoro de "Kontakto", ŝakludisto, fotaristo, medicisto, profesoro pri anatomio en la universitato de Simferopolo, Krimeo, Ukrainio, ebla estonta ano de la Akademio de Esperanto

1. Akuzativo kiel markanto de rekta objekto (rekta komplemento) de verbo.

La baza kaj plej ofte uzata funkcio de akuzativo estas servi kiel distingilo inter subjekto kaj rekta objekto. En esperanto la uzado de akuzativo por rekta objekto estas deviga.

Subjekto-estas la vorto, fraz-membro, kiu produktas, faras iun agon.

Predikato-estas vorto(plej ofte verbo), kiu esprimas la agon.

Objekto-la vorto, fraz-membro, kiu priskribas, kion koncernas la faratan agon. Objektoj povas esti **rektaj** (se la ago estas kvazaŭ senpere direktata al tiu objekto, rekte trafas tiun objekton-tio okazas, se la verbo estas transitiva kaj la ago rekte transiras de la verbo al la objekto) kaj **nerektaj** (por esprimi ĝuste, kiamaniere la ago koncernas tiun objekton, necesas nepre uzi iun prepozicion).

Rektaj objektoj estas esprimataj per akuzativo; **nerektaj objektoj** estas esprimataj per diversaj prepozicioj (laŭ la senco).

Ekzemploj: *Knabo skribas longan leteron en la ĉambro per kraĵono.*

En tiu frazo la subjekto estas **knabo** (ĉar li faras la agon, li skribas); la predikato estas **skribas** (la verbo esprimas la agon skribi); **longan leteron** estas rekta objekto (la skribado estas senpere direktita al la letero), ĝi estas esprimata per akuzativo; **ĉambro** kaj **kraĵono** estas nerektaĵ objektoj, ili esprimas pli-malpli flankajn, malpli gravajn aferojn, kiuj tamen estas iel ligitaj al la ago, ili estas esprimataj per uzado de prepozicioj **en** kaj **per**.

La akvo fluas laŭ la deklivo kun bruo.

La subjekto estas **akvo**. La ago, kiun ĝi faras, estas **flui** (predikato). La verbo **flui** estas netransitiva, ĝi ne povas havi rektan objekton (tiu ago kvazaŭ "ne povas" senpere trafi iun objekton). **Deklivo** kaj **bruo** estas du nerektaĵ objektoj, ili estas uzataj kun prepozicioj **laŭ** kaj **kun**. Ili priskribas du objektojn, kiuj estas ligitaj al la ago (priskribas lokon kaj produktatajn sonojn), sed tamen ne estas esence gravaj por ĝi.

La ekzisto de akuzativo en Esperanto ebligas uzadon de pli-malpli libera vortordo (ankaŭ de tiel nomata **inversa** vort-ordo). Kutime la subjekto troviĝas antaŭ la predikato, kaj la objekto troviĝas post la predikato (**kato manĝas raton**). Tamen eblas uzi alian vortordon sen damaĝo al la senco (**raton mangas kato**).

Verboj (Ne)Transitivaj:

Laŭ la povo de verboj esti uzataj kun akuzativo, oni dividas ilin je du grupoj: **transitivaj** (kiuj povas havi rektan objekton, esprimitan per uzo de akuzativo) kaj **netransitivaj** (kiuj povas havi nur nerektaĵ objekton). Ekzemple, **vidi**, **havi**, **ami**, **konstrui** estas transitivaj (mi vidas **tablon**, homo havas **du manojn**, Paŭlo amas **ŝin**, oni konstruas **domon**). Male, la verboj **esti**, **sidi**, **pendi**, **flori** estas netransitivaj, ili ne povas esti uzataj kun rekta objekto. (Ne)Transitiveco de la verbo estas ĝia konstanta eco, kutime fiksata en vortaroj (kiun necesas konsulti ĉe apero de dubo). Kiel aldona helpilo povas servi la jena sciigo: transitivaj verboj povas formi kaj aktivajn, kaj pasivajn participojn (amanta/amata), dum la netransitivaj povas formi nur la aktivajn (pendanta, ne eblas diri "pendata") Krome, ĉiuj verboj kun la sufikso -ig estas transitivaj, dum tiuj kun la sufikso -iĝ estas ĉiam netransitivaj. Plej oftaj problemaj verboj estos pridiskutitaj poste.

Kelkaj transitivaj verboj povas esti egale uzataj ankaŭ netransitive: *memori tion* = *memori pri tio*; *helpi iun* = *helpi al iu*; tio estas normala afero. Tamen oni ne uzu tiun manieron kun ĉiuj verboj, jen la listo de plej oftaj verboj kiuj permesas tion:

adiaŭi (al), atenti (pri), aŭskulti (al), danki (al), bedaŭri (pri), egali (al), esperi (al, pri), forgesi (pri), helpi (al), kontraŭi (al), kredi (al), ludi (per), memori (pri), adori (je), pardoni (al), partopreni (en), peti (pri), profiti (de, el), raporti (pri), respondi (al), rigardi (al), rilati (al), sekvi (post), servi (al).

Pere de prefikseca uzado de prepozicio eblas fari la netransitivan verbon transitiva: ridi pri io = priridi ion; batali kontraŭ io = kontraŭbatali ion. Ankaŭ la sufiksoj -ig kaj iĝ estas uzataj por tio (kompreneble, ankaŭ la senco de la verbo ŝanĝiĝas).

Generala regulo estas tre simpla - oni uzas akuzativon por ĉiuj vortoj, kiuj estas partoj de la rekta objekto, tamen praktike la situacio estas malpli facila, ĉar la lingvouzantoj emas uzi por Esperanto la kutimojn de sia propra lingvo, kio ofte estas misgvida (se akuzativo eĉ ekzistas en la koncerna lingvo, ĝia uzado estas pli komplika kaj neregula, ol en Esperanto).

Jen kelkaj praktikaj rekomendoj:

1. Penu ĉiam analizi la frazon - kiu estas aganto, tiu ne davas havi la akuzativan finaĵon.

2. Akuzativo neniam estas uzata post la prepozicioj (krom se ne temas pri tiel nomata akuzativo de direkto kaj kelkaj specialaj okazoj pri la prepozicio *krom, anstataŭ, ĉirkaŭ, tra, preter* - ni vidu poste). Ankaŭ en la frazoj de la tipo "*Mi havas multe da amikoj*" la akuzativo ne estas uzata, ĉar post "*da*" ĝia uzado estas erara.

3. En ĉiuj dubaj okazoj oni konsultu bonan vortaron por kontroli, ĉu la uzata verbo estas transitiva aŭ ne.

Plej ofte misuzataj verboj:

Komenci - komenciĝi: *Komenci* estas transitiva verbo: *Instruisto komencis la lecionon*. *Komenciĝi* estas netransitiva: *Leciono komenciĝis*. Oni neniuokaze diru: *Leciono komencas*.

Fini - finiĝi: *Fini* estas transitiva, *finiĝi* ne transitiva. Korekta uzado: *Instruisto finis la lecionon*. *La leciono finiĝis*. Oni ne diru: *leciono finis*.

Ĉesi - ĉesigi: *Ĉesi* estas netransitiva (laŭ la senco similas al *finiĝi*): *pluvo ĉesis, kvereloj ĉesis*. Sed aparta maniero uzi tiun verbon - ĝi estas uzebla kun infinitivo: *Mi ĉesis kanti* (ĉi tie ĝi jam similas al fini: *mi finis kanti*).

Tamen, rektan objekton la verbo *ĉesi* neniam povas havi: la formo "*Mi ĉesis kantadon*" estas erara. Male, *ĉesigi* estas transitiva verbo kaj povas esti uzata kun rekta objekto: *Mi ĉesigis kantadon*.

Daŭri - daŭrigi: *Daŭri* estas netransitiva verbo. Korekta uzado: *La leciono daŭras* (en la frazo "*la leciono daŭras 2 horojn*" la vortoj *2 horoj* estas ne rekta objekto sed tempo-adjekto, esprimanta la longeco de la ago, tio estas aparta uzado de akuzativo, ni vidu poste). *Daŭrigi* estas transitiva: *La instruisto daŭrigas la lecionon*.

Pasi - pasigi: La verbo *pasi* estas miksitaj, ĉar ĝi havas kelkajn sencojn. En la unua senco "*trairi*" ĝi estas transitiva. *Li pasis akvon kaj fajron kaj marĉojn kaj marojn* (tiu uzado ŝajnas iom malnoviĝinta, oni povas en tiu senco la verbojn *trairi, trapaŝi, trapasi*). Alia ĝia senco (pli ofte uzata) estas *finiĝi, malaperi* (pri tempo, sezono, kajtielplu), kaj en tiu senco ĝi estas uzata kiel netransitiva: *La vintro pasis; mia apetito pasis; kio estis kaj pasis, tion tempo frakasis*. Oni ofte eraras, dirante: "*Mi pasis someron en vilaĝo*". Por esprimi tiun sencon oni uzu la transitivan verbon *pasigi*: *Mi pasigis someron en vilaĝo*.

Okazi - okazigi: *Okazi* estas ne transitiva verbo: *Dum IJK okazas seminario pri E-gramatiko*. Oni ne parolu: *Oni okazis seminario*; por tiu senco estas necese uzi la transitivan verbon *okazigi*: *La organizantoj okazigis tre bonan E-aranĝon*.

Okupi - okupigi - okupiĝi: La verbo *okupi* estas miksitaj. En la senco "*esti en iu loko, perforte eniri iun lokon*", ĝi estas transitiva: *Libroj okupas la tutan tablon; okupi postenon; okupi la malamikan urbon*. Tamen en la senco "*mem fari ion*" ĝi ne estas uzebla; oni ne diru: *Mi okupas pri sporto*. Por tiu celo oni uzu la netransitivan verbon *okupiĝi*: *Mi okupiĝas pri hejmtasko*. Por la sama celo eblas uzi ankaŭ iom malnoviĝintan formon: *Mi okupas min pri legado*. La verbo *okupigi* estas kompreneble transitiva, sed havas alian sencan ol *okupi*: fari tiel ke iu plenumu ion agon, doni iun taskon al iu: *La instruisto okupigis nin pri legado*.

Manki: *Manki* estas netransitiva. Oni ne diru: *Mi mankas mono*, aŭ: *Al mi mankas monon* (ja mono estas la subjekto - ĝi faras agon, ĝi mankas). Korekta uzado estas: *Al mi mankas mono, al li mankas kuraĝo*.

Daŭrigota kun akuzativo de direkto kajtielplu

http://mevo.narod.ru/eo_ek.htm

<http://esperantio.narod.ru/abovo.htm>

<http://www.ikso.net/kantaro/doku.php?id=pluke-traduke>

LETERO DE LA PREZIDANTO DE UEA OKAZE DE LA ZAMENHOF-TAGO 15-12-2008

Karaj kaj estimataj, sur la sojlo de la 150-jarigo de Zamenhof, ni devas konstati, ke nia laboro finfine atingis sian vere komencan stadion. Post pli ol jarcento da laborado, la esperantistoj sukcesis:

(a) funkciigi vere vivantan lingvon, kies korpon produktis intertrakta procezo envolvanta modere grandan aron da lingvoj kaj sufiĉe klare ekzemplanta la intertraktadon mem;

(b) montri, ke komunumo kapablas, laŭ la modelo indikita de Zamenhof en sia Dua Libro, akcepti lingvodonacon de majstra iniciatinto, evoluigi ĝin laŭ demokratiaj linioj, kaj restadi ne sendanka al la majstro sed samtempe firme kapabla socie porti la lingvon sen absoluta dependo de la kapricoj de unu individuo;

(c) imagi kulturalan mondon, same aŭ pli vigle ol la naciaj literaturaj elitoj, kiuj per sia verkado imagas siajn naciojn - la nuntempa kompreno de nacioj donas chefroton al la 'imagado de la nacio' fare de ĝia literatura elito; doni konkretan, vivantan, relaksan formon al monda konversacio,

en kiu la aparta reliefighado jen de budapeshta, jen de skota, jen de praga, jen de iberia skolo naghlas en akvo kies freshecon daŭre garantias internacia komunumo verve deziranta la egalrajtecon de popoloj kaj do aktive leganta la cheferverkojn de Mickiewicz kaj Madach kaj Kiwi kiam ili aperas en Esperanta traduko - dum iliajn tradukojn en ekzemple la angla ne legas la internacia legantaro de tia tradukilo;

(ch) parte pere de la imagado de tiu kultura mondo kaj parte per sendependaj rimedoj kreaĵaj sine de diversaj movadoj kaj organizajhoj (mi metonime nomu la ekzemplon SAT, sed ghi estis/ estas nur la plej grava inter pluraj), koncepti la ideojn kaj strukturajn kondiĉojn por daŭripova kaj vigla paco, sen la nerealisma trudado de dolĉaj kaj ŝajnaj harmonioj koste de seriozaj solvoj al la problemoj de la kuna vivado;

(d) meti la demandon de la lingvaj homaj rajtoj firme sur la internacian tagordon kaj iniciati - tra la tiutempe ne tre volontaj korpoj kaj mensoj de neesperantistaj sociolingvistoj - studadon de la lingvoplanado rilate la problemon de internacia lingva komunikado, tiel ke tiu tereno de studado floru; chi tiun sukceson de la iniciato Lapenna-Sadler, lanchi sub la egido de CED de UEA la revuon LPLP (pranome LMLP) kiel ejon por tiu diskuto, ni nesufiĉe reliefigis, nun kiam chie konatighis la graveco protekti la

endangherajn lingvojn, kaj kiam la publiko ne demandas, kiuj respondecis pri la kultivado de tiu studkampo en momento kiam preskau neniu konsciis pri ĝia urheco;

(e) konsciigi la homojn, ke ankaŭ la lingva kaj kultura demokratio trovighas inter la konkretaj rajtoj kaj bezonoj de la homoj, kaj ke ilia malplenumigo estigas sendignighon, suferon, kaj proan mankon de la plena disvolvigho de la homa potencialo che la viktimoj de lingva kaj kultura diskriminacio;

(f) identigi la aldonan (diference de la subtraha) plurlingvismon kiel konkretan pozitivan aliron al la demando, kiamaniere plej bone protekti la rajtojn de la lingvaj malplimultoj, kaj klare opozicii kontraŭ la asimilismaj strategioj de shtatoj, kiujn UEA sub la gvido de Lapenna nomis lingve genocidaj kaj kiujn TEJO en la momento de Tyreso" nomis lingve imperiismaj;

(g) alighi al la malfacila projekto al la konstruado de mensa bazo por serioze daŭripova paco per konkreta programo eduki la infanojn por ke ili estu planedanoj kaj por ke ili vidu, ke la homa emancipigho okazos nur se ni fasonos inkluzivemajn vojojn de pluiro - projekto ankoraŭ ne aperanta sur la ĝenerala publika tagordo sur tiu skalo, sur kiu jam aperas la kompreno pri la bezono konservi la endangherajn lingvojn kaj kulturojn.

Per tiu laborado, la esperantistoj laŭ mia takso sukcese omaghis al la vivoverko de Zamenhof, kaj certigis, ke li ne estu vivinta vane. Mi volas, stare kun vi, festi la momenton, en kiu ni rigardas chi tiujn atingojn de la internacia komunumo, kiu per lia lingvo laboradis sub ekstreme rigoraj kaj malagrablaj kondiĉoj. Ne estas sufiĉe emfazis, ke Esperanto estas facila. "Ankaŭ arestitoj kaj kondamnitoj en karceroj vivas en paco," diris Lapenna. "Ni ne estas por tia paco." Ankaŭ viktimoj de asimilismo kaj trudado de granda lingvo, se ili estis devigataj akcepti tiun trudon en sia infanagho, trovas facila la devige lernitan lingvon; ni ne estas por tia facileco. Esperanto estas facila ponto, kies ekzisto invitas la homojn iri duonvoje por renkonti la alian, invitas la homojn konscie kunigi kun la aliaj por ebligi la renkontighojn. Nia lingvo stimulas la kunagemon de la homoj, ne ilian konsumisman emon pasive pasagheri en veturilo posedata kaj funkciigata de iaj mastroj. Zamenhof genie laboris, por ke estu facila tiu kunagado - ne por ke la posteuloj estu maldiligentaj kaj malkolegaj. Ni restu sur tiu vojo al la stimulado de la heroo, amika, pionirema aspekto de la homa spirito.

Amike salutas,

Probal Dasgupta, 15-12-2008

(la redakcio elektis publiku la leteron kiel dissendita origine rete sen supersignoj aŭ ĉapeletoj oportune anstataŭitaj de "h" laŭ Zamenhof-a sistemo)

NOVAĴOJ DE LA AZIA MOVADO



95_a jara Kongreso de Japanio, urbo Uakajama, 11 ĝis 13-10-2008



40_a jara Kongreso de Koreio, urbo Pusan, 18 kaj 19-10-2008



KURSO EN FOŝAN, KANTONO, ĈINIO

Kurso unugrada de Esperanto en la Altlernejo por Porprofesiaj kaj Teknikaj Studoj, en la Ĉina urbo Foŝan, apud Kantono, sukcese finiĝis pere de ceremonio dum kiu oni disdonis la atestilojn, al ĉirkaŭ 50 gelnantoj. Ĉiuj varme petegis ke la kurso duagrada baldaŭ rekomencu denove, kio certe okazos.

Augusto Casquero de la Cruz
Prezidanto de la Hispana Esperanto Federacio,
nun dumtempa, en diversaj Ĉinaj Universitatoj,
instruisto pri Esperanto kaj Hispana lingvo



Paĝo 9

110 VIZITIS LA MALFERMAN TAGON

La 29-a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA en sabato, la 29-a de novembro 2008, allogis 110 vizitantojn el 14 landoj. En la agadkalendario de UEA ĝi estis la lasta aranĝo dediĉita al la 100-jariĝo de la Asocio. La programo enhavis koncerton de Alejandro Cossavella, unu horan respondadon de estraranoj de UEA, prelegojn de Grégoire Maertens, Andreas Künzli, Marek Blahus, Ziko van Dijk.



Barbara, Claude, Loes :Tri estraranoj de UEA (sube publiko)



ALEJANDRO COSSAVELLA

Argentina esperantista kantisto, okazigis gitaran koncerton je la 26a de Novembro, dum merkreda kunveno de EBG, en kapelo de Krista Reviviĝo, strato Van Maerlant, apud la kunvenejo de la grupo, kun aliĝo de 55 kunvenantoj. Organizo de Françoise kaj Patrick Pellegrin, prezentado de Angelos Tsirimokos, fotado de Francine Sperber. Antaŭtage okazis bonvena vespermanĝo en tipa belga manĝejo Stekerlapatte kun 8 frandemaj kunmanĝantoj.



Maldekstre dekstren: Michael Cwik, Diemante Aniĉiene, Paulo Branco, Patrick Pellegrin, Amílcar Pinto de Sousa, Françoise Pellegrin, Alejandro Cossavella, José Augusto Pinto de Sousa



Angelos Tsirimokos prezentas muzikiston Alejandro Cossavella

Paĝo 10

LA MEMBROKVANTO DE UEA PLU ŜRUMPAS

Per granda fortostreĉo UEA sukcesis dum 2007 superi la magian limon de 6.000 individuaj membroj. La fina sumo por la jaro 2007 iĝis 6.011 individuaj membroj. En la jaro 2008 UEA evidente ne plu povis atingi la magian limon, ĉar fine de aŭgusto la membrostatistiko postrestis la pasintjaran je 266. Tamen la kvanto de aligitaj membroj altiĝas, ĉefe pro tio, ke Hungaria Esperanto-Asocio ĉi-jare raportis dekoble pli da membroj ol pasintjare.



En la diskutejo de la komitato de UEA la ĝenerala direktoro de la asocio ĵus raportis, ke UEA fine de aŭgusto havis 5540 individuajn membrojn.

- Laŭ la sperto oni povas atendi, ke almenaŭ 200 membroj ankoraŭ kotizos ĉi-jare. En tiu kazo la fina nombro estos ĉirkaŭ 5750, do klare malpli ol pasintjare (6011), kvankam iom pli ol en la malbonaj jaroj 2002 (5713) kaj 2003 (5714). Eblas tamen, ke la evoluo estos pli bona, ĉar la Bjalistoka UK iomete influos jam la ĉi-jaran membronombron, kvankam ĝia efiko ĉefe aperos en la statistiko de 2009. Al ĝi sendube aliĝos multaj kongresanoj, kiuj nun ne membras en UEA, skribis Osmo Buller.

La plej granda falo okazis en Japanio, kie nun estas 457 membroj malpli ol pasintjare. En Korea Respubliko estis falo de 50, li raportis.

- Kreskoj en la cetera mondo kompensas nur duonon de tiuj perdoj. Estas do facile vidi, ke Jokohamo havis pli fortan kongresan efikon ol Roterdamo, kies kongresanoj pli grandkvante estis regulaj membroj. En Japanio la membraro pli ol duobliĝis pasintjare, sed en Nederlando ĉi-momente estas nur 6 membroj pli ol en 2007. Pli da kongresa efiko estis en Francio (+36) kaj Germanio (+16), sed la plej granda kresko tamen okazis en Rusio (+53). Same pro la kongresa efiko nun kreskis la kvanto de TEJO-membroj. Pasintjare la

Internacia Junulara Kongreso okazis en Azio, kaj la membrokvanto ŝrumpis, ĉar multaj eŭropanoj ne veturis al la IJK. Ĉi-jare la eŭropa IJK kaŭzis, ke en aŭgusto 2008 TEJO havis 443 individuajn membrojn, 79 pli ol aŭguste pasintjare.

Kvankam la kvanto de individuaj membroj malkreskas, la suma kvanto de membroj en UEA ĉi-jare estos pli alta ol pasintjare, pro kresko en la kvanto de aliĝintaj membroj, atentigas Osmo Buller.

- Kelkaj landoj ankoraŭ ne pagis por aligitaj membroj, sed jam nun la nombro (11.405) estas preskaŭ sama kiel fine de 2007 (11.477). Aldoniĝos ankoraŭ ĉ. 400 aligitaj membroj, tiel ke la fina sumo estos ĉ. 300 pli granda ol en 2007. Aligitaj membroj plimultiĝis dank' al Hungaria E-Asocio, kiu pagis por 1.348 membroj kaj en 2007 nur por 142. Tio kovras la fakton, ke en multaj landoj la nombroj malkreskis.

Libera Folio

LINGVA DISKRIMINACIO

La angla estas la plej lernata lingvo nuntempa. Plie, eĉ se gelnantoj aŭ gepatroj havas elektelecon ili tendencas doni preferon al la angla. En Britio lernejoj devas instrui fremdan lingvon, eĉ se gelnantoj estas neniel devigataj studi iun ajn fremdan lingvon. Kontraŭe ekde 2007 en Francio kaj en Pollando ekde 2008-2009 kaj en Litovio ekde 2008 (por +8jaruloj) instruado de fremda lingvo fariĝis deviga. En Portugalio ĉiuj lernejoj devus ekde 2008-2009 oferti anglajn kursojn al infanoj inter la aĝo 6 ghis 10.

Krome en ne-anglalingvaj landoj edukreformoj puŝas al deviga instruado de fremdlingvo (legu la anglan) al eĉ pli juna aĝo. Tiele lingvo helpas krei neproporcan ekonomian kaj socian avantaĝon al eŭropanoj kiuj naskis de la angla lingvo, sammaniere kiel iuj blankhautaj naskitoj, siatempe en Usono kaj Afriko de fakte fariĝis unuranguloj. Hautkoloron oni ne elektas, samkiel plejofte oni ne povas elekti sian gepatran lingvon. Tamen lingvan diskriminacion kutime oni ne perceptas/vidas kiel diskriminacion kontraŭe al etna/rasa diskriminacio.

Germain Pirlot kolektis



MEMBRARA EVOLUO DE UEA

Dum la traktado de la Estrara Raporto en la UK mi menciis, ke la aktuala nombro de individuaj membroj estis malpli granda ol je la sama momento unu jaron pli frue. Mi promesis informi pli detale poste. Jen freŝaj ciferoj.

La 31-an de aŭgusto estis 5540 individuaj membroj. Tio estas 266 malpli ol je sama dato pasintjare (5806). Laŭ la sperto oni povas atendi, ke almenaŭ 200 membroj ankoraŭ kotizos ĉi-jare. En tiu kazo la fina nombro estos ĉirkaŭ 5750, do klare malpli ol pasintjare (6011), kvankam iom pli ol en la malbonaj jaroj 2002 (5713) kaj 2003 (5714). Eblas tamen, ke la evoluo estos pli bona, ĉar la Bjalistoka UK iomete influos jam la ĉi-jaran membronombrom, kvankam ĝia efiko ĉefe aperos en la statistiko de 2009. Al ĝi sendube aliĝos multaj kongresanoj, kiuj nun ne membras en UEA.

Kiel atendite, la plej granda falo okazis en Japanio, kie nun estas 457 membroj malpli ol pasintjare. En Korea Respubliko estis falo de 50. Kreskoj en la cetera mondo kompensas nur duonon de tiuj perdoj. Estas do facile vidi, ke Jokohamo havis pli fortan kongresan efikon ol Roterdamo, kies kongresanoj pli grandkvante estis regulaj membroj. En Japanio la membraro pli ol duobliĝis pasintjare, sed en Nederlando ĉi-momente estas nur 6 membroj pli ol en 2007. Pli da kongresa efiko estis en Francio (+36) kaj Germanio (+16), sed la plej granda kresko tamen okazis en Rusio (+53).

Antaŭvidita estis la plimultiĝo de junaj membroj, kiun kauzis la pli granda IJK. En aŭgusto TEJO havis 443 individuajn membrojn, t.e. 79 pli ol en aŭgusto 2007. Eblas, ke la fina nombro atingos 500 ĉi-jare, se oni iom puŝos.

La ĝeĵunuloj, kiuj membriĝis pro IJK, pagis la kotizon de Juna Membro kun Jarlibro. Tiu kategorio (nun 290) kreskis per 85 kompare kun aŭgusto 2007 (ĝi eĉ superas per 61 la finan nombron de 2007). La nombro de nejunaj Membroj kun Jarlibro (1282) estas je 124 malpli granda ol en aŭgusto 2007. Ankoraŭ pli falis Membroj-Abonantoj (2605; -168); ankaŭ la junaj MA (116) montras minuson (-6) kompare kun aŭgusto 2007. Notinda estas la plua malpopulariĝo de la malplej kosta kategorio, Membro kun Gvidlibro (269; -51). Eble MG estas malpli alloga, ĉar granda parto el ĝiaj informoj troveblas en Interreto senpage. Kelkaj landoj ankoraŭ ne pagis por aligitaj membroj, sed jam nun la nombro (11405) estas preskaŭ sama kiel fine de 2007 (11477).

Paĝo 11

Aldoniĝos ankoraŭ ĉirkaŭ 400 aligitaj membroj, tiel ke la fina sumo estos ĉirkaŭ 300 pli granda ol en 2007. Do, la nombro de aligitaj membroj kreskos verŝajne iom pli ol la nombro de individuaj membroj falos, tiel ke la totala membronombro de UEA povos iom superi tiun de 2007. Aligitaj membroj plimultiĝis dank' al Hungaria E-Asocio, kiu pagis por 1348 membroj kaj en 2007 nur por 142. Tio kovras la fakton, ke en multaj landoj la nombroj malkreskis.

Tre ĝojiga estas la bona evoluo de Societo Zamenhof (nun 162; antaŭ unu jaro 125) kaj Patronoj de TEJO (65, pasintjare 60).

Osmo Buller



UEA oficistoj maldeskstre dekstren: Stanca Starcevic, Pasquale Zappelli, Osmo Buller, Clay Magalhães

BULLER ĈE LA FINNA AMBASADORO

La ambasadoro de Finnlando en Nederlando, s-ro Mikko Jokela, akceptis la 28-an de oktobro la Generalan Direktoron de UEA, Osmo Buller en la ambasado por duhora interparolado. La ambasadoro faris la inviton, ĉar pro sia ferio en julio li ne povis viziti la Universalan Kongreson en Roterdamo.

Dum la renkontiĝo oni traktis praktike ĉiujn kampojn de la agado de UEA. La ambasadoro estis tre interesita pri la historio de UEA kaj Esperanto, kaj aparte pri la rolo de Esperanto kiel kultura pontolingvo. Tiu lasta temo speciale interesis lin pro tio, ke antaŭ sia diplomata kariero li multe esploris internacian kulturalan interŝanĝon, precipe libro- kaj kino-komercon. Liaj esploroj montris grandegan superregon de la angla lingvo kaj la fakton, ke la interŝanĝo ĉefe signifas kulturalan fluon el grandaj landoj al malgrandaj.

Gazetaj Komunikoj de UEA

Paĝo 12



Tobiasz Kazmierski, nova dungito de Centra Oficejo

NOVA DUNGITO EN LA CENTRA OFICEJO

Pli ol kvin kaj duona jaroj en la Kongresa Fako de la Centra Oficejo de UEA laboris nur unu dungito, la Konstanta Kongresa Sekretario. Tiu nenormala situacio ĉesis la 1-an de decembro 2008, kiam KKS denove ekdisponos pri asistanto. Per ĵusa decido de la Ĝenerala Direktoro eklaboros tiam kiel nova oficisto de UEA la 24-jara Tobiasz Kazmierski el Pollando. Tobiasz Kazmierski naskiĝis kaj kreskis en Poznano. Li studis sociologion en la tiea Universitato je la nomo de Adam Mickiewicz kaj spertiĝis ankaŭ pri merkato kaj vendado. Spertojn por sia nova tasko ĉe UEA li kolektis i.a. kiel kunorganizanto de la fama Esperanto-aranĝo Arkones kaj kiel respondeculo pri la vespera programo de la 61-a IJK en Zakopane en 2005. En 2003 li fondis kun kelkaj amikoj la junularan klubon E-Senco, kiu en 2007 transformiĝis en kulturalan asocion kun Kazmierski kiel unu el la vicprezidantoj. Li partoprenis ankaŭ en la reaktivigo de Pola Esperanto-Junularo, kies vicprezidanto li estis, kaj en la Ekonomia Forumo de Centra kaj Orienta Eŭropo en la pola urbo Krynica en 2007 kaj 2008, kie li helpis prizorgi informstandon pri Esperanto.

Gazetara komuniko de UEA



Osmo Buller kun Zamenhof-a nepo

VIDPUNKTO ALIA

Daŭras kaj eĉ intensiĝas la ludo je l' masakro interne de la UEA-medio kiu pivotas ĉirkaŭ la skandalgazeto de Kalle Kniivilä, kutime defendanta la interesojn de Osmo Buller kaj liaj amikoj. La nuna celtabulo estas Stano Marček, kiu transprenis de István Ertl en 2002 la ĉefredakton de la asocia organo.

La atakon formulis la iama TEJO-estrarano Andy Künzli, kies plej trankvila frazo estas: "Ciu numero fariĝas pli seninteresa, formala kaj oficialeca. La oktobra numero estas kulmino de tiu malpleneco." Renato Corsetti (pro kies prezidantiĝo en 2001 proteste kaj bloke maldungiĝis Buller, Ertl kaj Zapelli) pri la publika atako de Künzli apogata de Kniivilä publike komentis: "La lastatempaj atakoj de Andreas Künzli ŝajnas ĉiam pli folkloraj. Ke la membronombro falas pro la kvalito de la revuo, mi neniel povas kredi. Ankaŭ en la diskutoj en ĉi tiu listo aperis tute klare, ke estas multaj aliaj pli malsimplaj kaŭzoj."

Ligo inter la falo de la membronombro kaj la falo de la kvalito estis sugestita de kolego Aleksandr Korĵenkov: "La suma falo en la kvanto de membroj-abonantoj dum la lastaj dek jaroj egalas al 800 personoj: en la fino de 1998 estis 3.405 membroj-abonantoj, kaj laŭ la lasta statistiko publikigita de UEA nur 2.605." Tio fakte pruvus ke la falo komenciĝis jam antaŭ la enpostenigo de Stano Marček; kvankam, verdire, perdo de abonantoj karakterizis ankaŭ lian dujaran redaktorecon ĉe "Heroldo de Esperanto" (2000-2001, kun rapida rekresko ekde 2002).

Stano Marček estas eble la sola salajrato de UEA ne dungita rekte de la nuna ĝenerala direktoro, Osmo Buller, kiu fakte mem decidis pri la personaro de Roterdamo: li ja rolas pli kiel plenpova delegita administranto ol kiel konstanta referenculo de siaj dungintoj (la estraro). La pozicio de Marček jam malfirmiĝis komence de ĉi tiu jaro, kiam Roterdamo deprenis de li la prizorgon de la preso kaj ekspedo, lasante nur la redakton de la revuo.

La ludo je l' masakro praktikata en certa UEA-medio disvolviĝas laŭ kutima skemo, kies komencaj segmentoj povas varii (ne ĉiam konvenas utiligi la servon de Kalle Kniivilä), sed kies fina fazo estas la sama: meti la estraron aŭ eĉ la komitaton de UEA kontraŭ iu(j), kiu(j) ial ne ŝajnas oportuna(j) por la interesoj de la atakantoj. Se la atakato ne trovas defendantojn, li estas forlasita al sia destino de viktimo.

Andrés Martín, Esperanta Informado N°36, Málaga

UEA PRESENTAS SIN

Universala Esperanto-Asocio, nova asocia membro de ALTE, Asocio de Lingvotestistoj en Eŭropo, estis invitita prezenti sin dum ties internacia konferenco en **Lisbono** de la 12-a ĝis la 15-a de novembro. Kiel reprezentanto de UEA partoprenis Zsofia Korody. Apud la celoj, strukturo, agado, k.a. apartaĵoj de nia monda organizatio, specialan atenton ricevis la nova ekzamensistemo ellaborita surbaze de la Komuna Eŭropa Referencokadro (KER) kunlabore kun la Hungara Stata Ekzamencentro (ITK). Zsofia Korody raportis al la diverslingvaj fakuloj per detale ellaborita projekciado kaj prezentis specimenojn el la Esperantlingva testaro. La reprezentanto de UEA partoprenis ankaŭ en kelkaj fakaj laborgrupoj, interalie en tiu pri la lingva testado de infanoj kaj junularo.

Gazetaraj Komunikoj de UEA,

KOFFI GBEGLO "EKSKOMUNIKITA" DE UEA

La prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, Probal Dasgupta, marde la 7-an de oktobro publike deklaris, ke UEA ne plu povas havi laboran kontakton kun Koffi Gbeglo, komitatano A por Togolando. Tion laŭ Probal Dasgupta unuanime decidis la tuta estraro de la asocio. La kialo de la decido laŭ li estas la kalumniakaj publikaj deklaroj de Gbeglo Koffi pri oficistoj de la asocio, deklaroj kiuj laŭ Probal Dasgupta atestas pri "malobservado de tute bazaj principoj de la deco". Koffi Gbeglo estas antaŭa estrarano de UEA, sed konfliktis kun la asocio ekde la dua jaruono de 2005, kiam la estraro de UEA ne plu volis daŭrigi la favorajn kondiĉojn de la Afrika Oficejo de UEA, gvidita de Koffi Gbeglo. Tiam la intimaj rilatoj inter li kaj la Esperanta Civito kaŭzis multan kritikon en la komitato de UEA. Ankaŭ la prisilentata demisio de unu el la afrikaj oficistoj tiam mirigis komitatanojn de UEA. La kontrakto kun la Afrika Oficejo de Koffi Gbeglo, finance favora al li, ne estis renovigita de UEA, kaj ekde tiam Koffi Gbeglo per diversaj minacoj, kun publika instigado de la Esperanta Civito, klopodas influi la gvidantojn de UEA. La insistaj postuloj de Koffi Gbeglo dum longa tempo temis pri monprunto donita de UEA al la projekto Indiĝenaj Dialogoj dum la periodo kiam li mem estis estrarano de UEA. La prunto neniam estis repagita pro la malsukceso de la projekto, kaj kvankam estis nenio sekreta pri la afero, Koffi Gbeglo minacis "malkaŝi" ĝin, se la estraro de UEA ne plenumos liajn postulojn. Pri siaj minacoj al la estraro Koffi Gbeglo mem rakontis en la diskutejo de la komitato de UEA, en mesaĝo al

Paĝo 13

la tiam ĝenerala sekretario de UEA, Ulla Luin: - Certe vi memoras miajn minacojn al la estraro pri tiu prunto. Ekde oktobro 2005 mi minacis publikigi la aferon, se vi... Certe vi memoras, ĉu ne? De tiam Koffi Gbeglo multfoje levis la temon de la malnova monprunto en la diskutejoj de UEA, sed ne sukcesis konvinki la membrojn aŭ la komitatanojn pri sia pravenco. Sian plej freŝan provon li faris dum la Universala Kongreso en Roterdamo, sed daŭre sensukcese. Post sia fiasko en Roterdamo Koffi Gbeglo ŝajne perdis la esperon pri la monprunta intrigo, kaj anstataŭe intensigis siajn provojn ĵeti koton - unue en privataj kaj poste ankaŭ en publikaj mesaĝoj - sur unuopajn oficistojn de UEA per krudaj kalumnioj pri seksa orientiĝo al li ne plaĉa.

Libera Folio



Koffi GBEGLO en la Kongreso de Roterdamo

LA KALUMNIOJ SANKCIITAJ

"Osmo BULLER pliafoje dupigis la komitaton de UEA, driblis plejparton de Komitatanoj kaj Renato CORSETTI ruze evitis lian finton. La 25-an de julio 2008, dum la komitatkunsido, la vortoj de Osmo estis tiom misgvidaj, ke plejparto de komitatanoj decidis aferon tre gravan por la movado en Afriko. Tiu decido concernas kunlaboron glatan inter afrikaj Esperantistoj kaj konfirmon de sendependiĝo de Afrika Agado de Hans BAKKER nun realigata en Afrika Centro Esperantista en Togolando. Ne estas la unua fojo, ke Osmo tiel agis. Necesas memori kelkajn driblojn por vidi ĉu la homo estas en ĝusta loko por progresigi UEA-n en tiu ĉi 21-a jarcento. En 2001 okazis la tiel nomata Afero F. Tiam Osmo BULLER estas akuzita pri uzado de UEA-membroj..." kaj tiel plu ... longa dokumento de 2300 vortoj, 6 paĝoj.

KONSCIU N°39 de Koffi GBEGLO

Paĝo 14

POEMARO ALVENO DE LA JARO 2009

El la arboj falas melankolie,
Eltiritaj de la aŭtuna vento,
Folioj, kiuj mortas en silento
Sur la patrina tero blank-glacie.
Ankaŭ ĉiujare, senemocie,
El la kalendaro, kiel torento,
Falas akurataj, kun diligento,
Folioj en la tempon, agonie.
Monato post monato oportuna
Glitas tra la tempo la foliaro,
Malaperante kiel lumo-luna
Aŭ kiel la flugiloj de Ikaro.
Mortiga du mil ok jaro-maljuna;
Do: Vivu la du mil naŭ nova-jaro!!!

Alberto Garcia Orive, Bilbao, Hispanio

AŬTUNA SENTO

Kiel ĉiujare, el la somero,
puŝita de blovada varma vento,
per fulmotondra bruluma lamento,
venas la griza aŭtuno-mistero.
Somero, dissolviĝis en la aero,
kiel gutoj-akvo en la torento;
planedoj, en griznuba firmamento;
aŭ mortintaj folioj, en la tero.

Ankaŭ mia trista melankolia
animstato, falas el la koncio
de mia revo-songo iluzia,

Al la grizaŭtuna senemocio,
dissolviĝante la spirito mia
en l'profunda puto de la nenio.

Alberto Garcia Orive, Bilbao, Hispanio

AŬTUNO

Stranga tago. Stranga vento. Stranga sun'.
Pendas peze svaga mavo en aero.
Mi ekskribas la respondon. Eĉ vetero
ne bonvolas ial min asisti nun.

Mi ekskribas la respondon. La leter',
peza pli ol la aera mava eno,
ĵus forbrulis facile en kameno -
kaj la peza cindro donos al la ter'
la instigon por ke floroj kresku bunte,
semoj nepre maturiĝu, kaj fekunde
ripetiĝu en printemp' la vivorond'!

Stranga tago. Stranga vento. Stranga suno.

Mi hodiaŭ tamen restas en aŭtuno -
kie prenu mi la vortojn por respond'?

Miŝa Bronŝtejn, Tihvin, S.Petroburgo, Rusio

AŬTUNO

Aŭskultu venton kiu blovas de montetoj
forflugis jam mia somero
la rozo bonodoras
jen la ĉielo grizbluas
forflugis jam mia somero
mi vivos ĉi-aŭtune nur laŭ mia plaĉo
la lago grizbluas
tuj mia revo veros

mi vivos ĉi-aŭtune nur laŭ mia plaĉo

la rozo bonodoras
tuj mia revo veros

aŭskultu kanton kiu venas de montetoj

Luiza Carol, Rumanio

ĜENERALA JARKUNSIDO: 14-9-2007

Ĉeestintaj efektivaj membroj:

Eric BAERT, Clara BRACKE, Michael CWIK, Marcel DELFORGE, Marc DEMONTY, Claude GLADY, Françoise PELLEGRIN-BALZA, Françoise SPERBER, Angelos TSIRIMOKOS

Sinsenkulpigintoj:

Hélène FALK-BRACKE, Paulo BRANCO
Forestintoj: Dafydd ap FERGUS, Georgia HENNINGSEN, José PINTO DE SOUSA

Ĉeestinta neefektiva membro:

Jean STEINFORT
Kasista raporto: prezentita kaj aprobata post kelkaj petoj pri klarigoj. Financa stato bona, permesanta utilajn elspezojn.

Nuna stato de EBG: skizita de la prezidanto. Ne spektakla, tamen ne malkontentiga. Aparte rimarkinda la nombro de kursanoj, i.a. junaj. Dankon al Françoise PELLEGRIN kaj la aliaj kursgvidantoj, sed ankaŭ al Joelle CORROY, kiu organizis efikan informadon ene de la Eŭropa Komisiono. Dankon ankaŭ al Hélène FALK, pro ŝia diligenta kaj akurata redaktado de "Aktuala" dum 17 jaroj(!), kaj al la triopo (Françoise PELLEGRIN, Nelly BRACKE kaj Clara BRACKE) kiu organizis la memorindan Zamenhof-feston.

Estraro: malŝarĝita kaj reelektita; Paulo Branco komisiita redakti estonte la bultenon "Aktuala"

Decidoj pri la estonteco: Michael Cwik komisiita esplori la merkaton kaj eventuale aĉeti komputil-taŭgan projekciilon (t.n. "beamer") por la Grupo. Alloga inform-materiale farota de Claude GLADY (evt. laŭ la modelo de APE)

Angelos TSIRIMOKOS

ANONCO : ĜENERALA JARKUNSIDO 2008

Okazos la 5-an de novembro je la sepa vespere (unua merkredo) en nia kutima kunveno: rue Van Maerlant,2.

Ĉiuj membroj estas invitataj ĉeesti, kaj povas kandidatiĝi por posteno de komitatano aŭ de administranto
Konforme al la statuto ASPC(Asocio sen profita celo) nur la efektivaj administrantoj formas la ĝeneralan kunsidon. Se vi estas unu el ili, via ĉeesto estas necesa: gesinjoroj Eric BAERT, Clara BRACKE, Paulo BRANCO, Françoise PELLEGRIN, Francine SPERBER, Angelos TSIRIMOKOS, Georgia HENNINGSEN, Hélène FALK-BRACKE, Claude GLADY, Michael CWIK, José Pinto de SOUSA.

Se vi ne povas ĉeesti aŭ se vi ne plu volas esti administranto, bonvolu averti Hélène Falk kiel eble plej rapide (02/358 42 14) helene.falk@skynet.be

TAGORDO:

1- raporto de la kasisto kaj elekto de 2 kontrevizoroj
2- la prezidanto prisribas la nunan staton de la grupo.

3- raporto de la sekretario.

4- malŝarĝo de la nunaj komitatanoj:

Prezidanto :Angelos TSIRIMOKOS,
Vicprezidanto : Georgia HENNINGSEN

Sekretario : Hélène FALK-BRACKE

Kasisto kaj delegito UEA : Claude GLADY

Informado : Michael CWIK

Sen definitiva tasko : José Pinto da SOUZA

5- prezento de la kandidatoj por la estraraj postenoj

6- elekto de la novaj estraranoj

7- ĝenerala antaŭvida agado, kaj agadoj por la jam komenciĝinta lerneja jaro.

Hélène FALK, 15-10-2008

Protokolo de la ĝenerala jarkunsido : 05 - 11 - 2008

Partoprenis: Angelos TSIRIMOKOS, prezidanto,
Claude GLADY, kasisto kaj delegito UEA
Hélène FALK-BRACKE, sekretario
José PINTO DE SOUSA, sen difinita tasko

ALIAJ EFEKTIVAJ MEMBROJ: Eric BAERT, Paulo BRANCO (redaktoro de AKTUALA),
Françoise PELLEGRIN (kursgvidanto), Francine SPERBER.

Petis senkulpigon: Georgia HENNINGSEN, vic-prezidanto, Michael CWIK, informado, Clara BRACKE
ALIAJ EBG-MEMBROJ ĈEESTINTAJ: M. DELFORGE, A. DEMARQUE, S. TITE.

Raporto de la kasisto : Ĉi-jare, nia bonhavo atingas la plej granda sumo kiun EBG atingis : **28.888 eŭrojn**, dank'al la heredaĵo de nia mecenato kaj multjara membrino, la karmemora Elfriede ERNST.

Pro la nuna financa krizo, kaj ankaŭ pro teknikaj malfacilaĵoj ligitaj al la du adreso de la kasisto, ni ne metis parton de tiu sumo en intereso-donan konton. La prezidanto forte rekomendis meti parton de la sumo en pli profitan deponon, kompreneble kondiĉe ke ĝi estu ne malpli sekura ol la poŝtĉekkonto.

Nia kasisto, kiu de unu jaro loĝas en Valonio petas ke iu alia reprenu sian postenon.
"Post la ĝenerala jarkunveno, sin proponis Jan AMADORI, mem fakulo pri kontoj"

Raporto de la prezidanto :

- Nombro de membroj atingis nur 91. Necese pli bone ordigi la revokon al membroj kiuj forgesas pagi, komence de la jaro. Eblus pli bona kunlaborado inter redaktoro kaj kasisto.

- EBG estigis **Premion Elfriede Ernst**, celantan pagi parton de la vojaĝkostoj al junuloj, kiuj bone progresis en sia lernojaro kaj volas dum la ferioj partopreni internacian aranĝon. La celo estas kuraĝigi junulojn, por ke ni ne estu la lasta generacio de E-istoj!

Ĉijare, 2 junaj studentoj estis premiitaj: Muriel PETIT kaj Ludovic BOUTELIGIER. Ili partoprenis la IJKon en Hungario, kaj tiel plibonigis sian lingvoscion kaj sentis la specialan fratecan etoson de tiaj kunvenoj.

- Kiel lastjare, EBG enkalkulis novajn EU-oficistojn. Sed ili restas minoritato!

- Niaj ĉiusemajnaj kursoj plu funkcias. Taŭga inform-agado ĉe la EU-staĝanoj je la ĝusta momento (**dankon al Joëlle CORROY kaj Ole OSTERMANN**) allogis **ok** al la unuagrada kurso, gvidata de Françoise PELLEGRIN. Funkciis ankaŭ duagrada kurso, gvidata alterne de Gregory De Ketele, Marc DEMONTY kaj Jacques PONJEE

- Paulo BRANCO, nia **nova redaktoro/presisto/ekspedisto de AKTUALA**, prezentas al ni tute renovigitan bultenon, tre allogan dank'al ĝiaj koloroj, fotografajoj, bildoj, raportoj pri eksterlandaj eventoj. Paulo estas vere ambasadoro por EBG, kaj nelacigebla, anoncas ke ekde januaro 2009, AKTUALA denove estos ĉiujmonata revuo! Gratulon kaj dankon ! Artikoloj de membroj estas bonvenaj.

Raporto de la sekretario: Ĉio funkcias glate.

Antaŭvidataj agoj : Renovigo de la faldfolioj kiuj prezentas Esperanton en Bruselo.

La Estraro estas malŝarĝita kaj aklande reelektita, i.a. manke de aliaj kandidatoj.

La protokolinto : Hélène FALK – sekretario.



EBG Asembleo Ĝenerala maldekstre dekstren starante Claude Gladly, Hélène Falk, Angelos Tsirimokos, Marcel Delforge, Pinto de Sousa, sidante André Demarque, Diemante, Paulo Branco, Simon Tite, grandplane Eric Baert, en dua foto dekstre ankaŭ Francine Sperber



Muro de centra oficejo, Roterdama, kun fotoj de eksaj prezidantoj de Universala Esperanto Asocio, 18 dum 100 jaroj.

PROGRAMO DE LA MERKREDAJ KUNVENOJ

Novembro 2008

5 **Asembleo ĝenerala de Esperantista Brusela Grupo**
12 **Rakonto pri la staĝo de 7 al 9, Morbecque-le-Parc, Franca Flandrio**
19 **Bernard-Regis Larue pri Astronomio, la Suno**
26 **Koncerto ĝitara de Alejandro Cossavella el Argentino**
29 **Sabata malferma tago en Roterdama Centra Oficejo, de UEA / TEJO**

Decembro 2008

3 **André Demarque pri kio signifas esti esperantisto**
10 **Vladimira Chvatalova pri ŝia projekto de helpo al orfoj en Afriko**
13 **Sabata festo pro Zamenhof-tago (15-12)**

Januaro 2009

7 **Unua merkreda kunveno de la jaro, rakontu pri Kristnasko kaj Novjaro**
14 **Bernard-Regis Larue pri Astronomio, planedoj Merkuro, Venuso, Urano, Neptuno**
21 **André Demarque pri neologismoj (kun lernantoj 2a grado)**
28 **Michael Cwik pri prezentado de fotoj de UK kaj aliaj**

Februaro 2009

4 **Marcel Delforge pri la unuaj paŝoj de Esperanto en Belgio**
11 **Marek Blahus, studento en Loveno el Brno, Ĉeĥio pri**
18 **Barbara Poterucha pri historiaj skizoj el Pollando**
25 **Georgia Henningsen pri Chopin, vivo kaj amo**

Marto 2009

4 **Katarzyna Kuszke pri la tago de la virino**
11 **José Augusto Pinto de Sousa pri pola radio en esperanto**

Aprilo 2009


29 **Marcel Delforge pri vojaĝoj en Pollando**

Preskaŭ trideko de partoprenantoj

kunvenis por la prelegoj de André Demarque kaj Vladimira Chvatalova



André Demarque kun la redaktoro post prelego de la 3-12; kaj Vladimira Chvatalova prelegante je la 10-12



Prelego de André Demarque (li estas unua maldekstre); kaj prelego de Vladimira Chvatalova